

Eŭropa Bulteno

Januaro 2019, Numero 188

SPOMENKA ŜTIMEC 70-JARA



Spomenka Ŝtimec naskiĝis la 4-an de januaro 1949 kaj sekve nun ŝi estas 70-jara. Tiukaze en januaro E-societo Tibor Sekelj el Zagrebo kaj Literatura domo en Maribor dediĉis tribunojn al ŝi prezentante ŝian enorman kontribuon al E-kulturo, sed ankaŭ al la kroata kulturo. Tial mi dediĉas tiun ĉi lokon por dediĉi al ŝi spacon merititan. Ŝi estas erudito kun multaj profundaj scioj aparte en la kampoj de kulturo kaj edukado. Ŝi kapablas ne nur verki, sed ankaŭ prelegi kaj paroli publike pri multaj temoj.

Ŝi finstudis la germanan kaj francan lingvojn kaj poste detale ellernis Esperanton, do ŝi estas bona konanto de lingvistiko kaj mondaj literaturoj. Ŝi estas kunaŭtoro de la lernolibro de E laŭ la Zagreba metodo kaj ŝi instruis en plurdeko da kursoj ĉiuspecaj: por infanoj, gejunuloj, studentoj, plenkreskuloj, en elementaj lernejoj, en

mezaj lernejoj, en universitatoj.

Ŝiaj kulturaj interesoj komenciĝis per interesiĝo por literaturo kaj ne nur ke ŝi iĝis esperanta originala verkistino kaj ankaŭ kroatlingva, sed ŝi verkis ankaŭ plurcenton da porĵurnalaj artikoloj kaj eseoj kaj en la kroata kaj en esperanto. Ŝi persone korespondis kun deko da famaj kroatserbaj verkistoj en tuta tiama Jugoslavio kaj kompreneble kun tre multaj esperantaj verkistoj ŝi amikis. Laborante en IKS ŝi fruaĝe komencis konatiĝi kun la pupteatra arto kaj iom post iom ŝi profundigis tiujn sciojn kaj interesojn irante al diversaj festivaloj, pupteatraj fakaj aranĝoj kaj verkis recenzojn. Tiu intereso iris tiam ankaŭ al teatro ĝenerale (ŝi interalie verkis du dramojn). Ŝiaj interesoj ligiĝis iom ankaŭ al pentro- kaj skulptoartoj. Sekve por E-Movado ŝi estis kaj estas ege utila, ĉar ŝi povis plenumi kiun ajn komplikan taskon reprezentante la movadajn instancojn ĉe superaj politikistoj, kulturpersonecoj kaj en ĉiuj publikaj medioj. Dum dudeko da lastaj jaroj ŝi same bonis kiel socia kaj financa organizanto sub kies gvido evoluis KEL, Literatura internacia agado estante certatempe skretariino de Verkistaj asocioj, kaj gvidanto de Renkontiĝo de verkistoj kaj tradukistoj. Ankaŭ tre komplikajn financajn transakciojn ŝi plenumis kaj organizis: gvidis LKK de UEA-kongreso

en 2001 kaj gvidis dekon de LKKoj de TEJO-kongresoj, importigis grandan monumenton de dana skulptiusto al Zagrebo kaj starigi ĝin en bela loko en la urbo, prizorgis financadon de aĉeto de la propra E-domo en Zagreba urbocentro kaj ankaŭ starigon de la propra domo – Esperanto-centro en vilaĝo Hrašćina en Kroata Zagorje. Ŝi ankaŭ multfoje interpretis ĉefe inter la kroata kaj Esperanto kaj redaktis multajn librojn kaj la revuon TEMPO de KEL. Ŝi ofte kunlaboris kun E-asocioj de blindaj esperantistoj, prizorgis son-gazeton kaj gazetojn en brajla skribo, helpis organizi kelkajn internaciajn blindulajn kongresojn.


Per tio la listo de ŝiaj aktivadoj eĉ ne duone estas elĉerpita kaj krome ŝi kun egala energio plu aktivis. Sub ŝia gvido okazas agado por agnoskigi Esperanto-literaturon kiel kroatian nacain kulturheredaĵon kio estas en fina stadio por agnosko.

Pri ŝia plej valora aktivado en E-Movado – ŝia originala literatura kreado, mi ne skribos ĉi tie, ĉar eblas pri tio legi en aliaj studoj. En la libro Nia Diligenta Kolegato – ŝi estas eternigita kiel unu el 200 plej gravaj esperantistoj de la tuta monda E-historio.

Zlatko Tišljarić

AŬGUSTE EN TRIESTO

Jam en la antaŭa numero de tiu ĉi Bulteno, oni informis pri la elekto de Triesto kiel urbo de la 86a Itala Kongreso de Esperanto en 2019, kiu okupos la lastan semajnon de aŭgusto. Ĝia temo “Multkulturismo kaj plurlingvismo, hodiaŭ” estas aparte taŭga por kongreso ĉi tie, kie jam de 300 jaroj funkcias kaj disvolviĝas unu el la plej gravaj eŭropaj havenoj. Kaj la Haveno de Trieste celebras sian 300an datrevenon la 18an de marto ĝuste ĉijare.



Fakte en tiu tago de la jaro 1719, Imperiestro Karlo la 6a fondis la Liberan Havenon de Triesto per speciala dokumento kiu komplete ŝanĝis la urban historion kaj eĉ tiun de la Habsburga Imperio, unue kaj de la eŭropaj merkatoj, poste. Dum tiuj ĉi tri jarcentoj, la haveno


ludis fundamentan rolon en la komercaj rilatoj inter la Malnova Kontinento kaj Oriento, sufiĉas ekzemple. pensi pri la disvolviĝo de la komercado sekve de la inaŭguro de Suez-Kanalo. Ankoraŭ nun la Libera Haveno - kiel ni konas ĝin - ekde la 18a jarcento, respegulas la decidojn de Karlo la 6a kaj de Maria Theresia pri ĝia atribuo de "Imperia Haveno".

Danke al la starigo de tiu ĉi Libera Haveno, multaj personoj (komercistoj, bankistoj, laboristoj, entreprenistoj ktp ktp) alvenis ĉi tien el la mediteraneaj landoj kaj el multaj aliaj partoj de la mondo. Haveno estas jam simbolo per si mem de interŝanĝo de ideoj, opinioj, varoj, vivmanieroj, lingvoj, kaj tiel evoluis Triesto en etoso multkulturisma kaj plurlingvisma.



Ekde tiu 1719 ĝi disvolviĝis precipe danke al la Libera Haveno ĝis la unua mondmilito, kaj de malgranda fiŝista vilaĝo ĝi transformiĝis en unu el la plej kulturaj kaj kosmopolitaj lokoj de tiu epoko, kaj konkurencis kun la plej grandaj kaj famaj eŭropaj ĉefurboj. Post la fino de tiu granda kaj longa milito, ĉio ŝanĝiĝis, eĉ por la Libera Haveno. Sed ĝuste nun tiu Haveno komencis denove ekflori kaj novaj projektoj, planoj kaj intencoj aperis. Interalie oni volas renovigi, plibonigi, restaŭri la kernon de tiu

Libera Haveno cele al ĝia utiligo ankaŭ kiel ĉefa granda kulturcentro.



Dum la kongreso, ni povos viziti ĝin kaj ĝiajn muzeajn instalaĵojn. Estas loko fascina, interesa, lokita kompreneble ĉe la maro, nuntempe malfermita al publiko. Ni invitas vin kongresi kun ni en Triesto kaj viziti ankaŭ tiun ĉi historian lokon kiu tre grave rolis en la pasinteco de la urbo, sed tre grave rolos ankaŭ por ĝia estonteco kiu jam estas ĉe la pordo.

Multkulturismo kaj plulingvismo, hodiaŭ, en Triesto, en Italio kaj Eŭropo estas temo tre aktuala kaj

pridiskutenda. EEU prezentos kelkajn referaĵojn pri la eŭropa politiko, pri instruado de lingvoj ĝenerale kaj en la diversaj lernejoj, kaj krome prezentos sian projekton pri ellaborado de akcelilo por pli facila kaj rapida lernado de lingvoj pere de helpa lingvo, uzebla jam ekde la tria klaso de baza lernejo. Tiu ĉi projekto ŝuldiĝas al kunlaborado inter pluraj institucioj, inter kiuj lernejoj kaj universitatoj, kaj estis financita de Eŭropa Komisiono. Vere interesaj argumentoj, pri kiuj ni havos pli klaran bildon rilate la problemon de lernado kaj internacia komunikado.

Informoj pri la kongreso ĉe:

<https://kongreso2019.esperanto.it/eo>

Edvige Ackerman

NI DEBATU LA LINGVAN SITUACION EN EŬROPO POST LA BRITELIRO

La lingva situacio en Eŭropo estos la gvida temo de la 78a Hispana Kongreso de Esperanto, kiu disvolviĝos en Malago inter la 1a kaj 5a de majo. La renkonto okazos preskaŭ koincide kun la kampanja periodo por la Eŭropa Parlamento kaj kelkajn semajnojn post la (supozebla) eliro de Britio el la Eŭropa Unio.

Ĉu sencas ke la angla lingvo konservu la privilegian rolon kiun ĝi fakte tenas en la institucioj de la EU? Ĉu konserviĝos la nuna lingva reĝimo, karakterizita per teoria egaleco inter la oficialaj lingvoj, sed kun klara praktika dominado fare de iuj majoritataj lingvoj, establita per la forto de la faktoj? Kiun favoras tiu fakta reĝimo? Ĉu la nuna malkontento pri Eŭropo en multaj landoj kaj tavoloj rilatas al tiu sistemo de dominado, pri kiu la lingvoj estas plua manifestiĝo? Ĉu neŭtrala internacia lingvo povus havi rolon en la nova lingva reĝimo kiun oni nepre devos fiksi post la Briteliro?

Pri ĉio ĉi oni devus paroli en la venontaj monatoj, kaj Hispana Esperanto-Federacio deziras esti parto de tiu ĉi debato, prezentante la rolon kiun Esperanto povus ludi kiel neŭtra komunikilo kaj kiel helpa ilo en la interŝtata komunikado. Dum tiu ĉi jaro 2019 ni planas organizi diversajn aktivadojn por konsciigi la ĝeneralan publikon kaj specife la politikistojn, ke alia lingva sistemo eblas en Eŭropa Unio, kaj ke nun estas la momento ĝin diskuti, kaj ne devigi per la forto de la faktoj.



La Hispana Kongreso de Esperanto, kiu ĉijare okazos kune kun la Andaluzia Kongreso, estos la momento pruvi ke alia komunikado eblas kaj dezirindas. Ni planas ne nur diskuti pri la rolo de la lingvoj en Eŭropo, sed ni pruvos ke tiu estas praktike ebla: ni antaŭvidas la ĉeeston de pli ol centoj da vizitantoj el aliaj landoj, partoprenontoj en la Internacia Kongreso de la Federacio de Esperantistaj Fervojistoj, kiu parte koincidos kun la nacia renkontiĝo. Dum tiu ĉi semajno ni havos la okazon rilatiĝi al personoj de ĉiuj kulturoj, utiligante lingvon internacian,

neŭtralan, simplan, kiu neniun diskriminacias.

El BIT-Bulteno de HEF

UEA kaj UN EN 2019-20 – MULTLINGVA KUNLABORO

La oficejo de UEA en Novjorko troviĝas vidalvide de la ĉefa sidejo de Unuiĝintaj Nacioj (UN), ĉe la adreso 777 United Nations Plaza. De multaj jaroj, do, tiu cifero havas apartan signifon, kiel simbolo de la longadaŭra kunlaboro inter la ĉefa monda asocio de esperantistoj kaj la ĉefa monda organizo de la ŝtatoj.

Tial, en ĉi tiu 777a Gazetara Komunikado, ni enfokusigas la nunajn formojn de tiu kunlaboro, kiu daŭre iĝas pli proksima, pli intensa, kaj pli vasta laŭ sia temaro. La kampon vigle kaj atente gvidas estrarano Sara Spanò, kun laŭbezona subteno de la prezidanto Mark Fettes, aliaj estraranoj kaj la Ĝenerala Direktoro.



Jam de pli ol 60 jaroj, UEA kultivas kunlaborajn rilatojn kun pluraj branĉoj de UN. En Novjorko, temas pri la Departamento pri Publika Informado (DPI: ekde 1 jan. 2019 nove nomata la Departamento de Tutmonda Komunikado) kaj la Ekonomia kaj Socia Konsilio (EKOSOK); en Parizo pri la Organizo de UN pri Edukado, Scienco kaj Kulturo (Unesko), kaj en Ĝenevo kaj Vieno pri diversaj organoj de UN rilate al paco, homaj rajtoj, kaj indiĝenaj popoloj. Ĉiujare ni renomumas niajn oficialajn reprezentantojn en tiuj urboj. En la nuna jaro temas pri:

- **UN-Novjorko:** Ĉefreprezentanto: Humphrey TONKIN. Reprezentantoj: Jonathan LIECHTY, Michael BRANDINI, Ulrich BECKER. Raúl J. GARCIA.
- **UN-Ĝenevo:** Ĉefreprezentanto: Stefano KELLER. Reprezentantoj: Alain FAVRE, Nicole MARGOT, Francesco REALE.
- **UN-Vieno:** Ĉefreprezentanto: Hans-Michael MAITZEN. Reprezentantoj: Norina FLORINETH, Alfred HEILIGENBRUNNER.
- **Unesko-Parizo:** Ĉefreprezentanto: Renée Triolle. Reprezentantoj: Barbara DESPINEY, François LO JACOMO.

Ekde marto 2018 UEA troviĝas en la estraro de la Konferenco de Negistaraj Organizoj (NRO-oj) en Konsultaj Rilatoj kun UN (vidu GK №736). Tie ĝi kunlaboras kun 17 aliaj internaciaj NRO-oj pri plej diversaj aspektoj de la laboro de UN. Interalie, UEA estis la ĉefa aŭtoro de la komunikado de la Konferenco okaze de la 70a datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj en decembro 2018. Dume la junulara sekcio de UEA, TEJO, kunlaboras en la estraro de la Internacia Kunordiga Renkontiĝo de Junularaj Organizoj (IKRJO), kaj aktive kontribuas al diversaj UN-eventoj kiel la Junulara Forumo de EKOSOK (8-9 aprilo). La kunlaboro inter la du asocioj, UEA kaj TEJO, estas vere modela ĉi-terene.

Ekzistas longa tradicio de konferencoj kaj simpozioj de UEA en Novjorko pri temoj rilataj al UN. En la lastaj jaroj, temas pri simpozioj de la Stud-Grupo pri Lingvoj kaj UN, okazantaj dum du tagoj en majo. En la simpozioj partoprenas tre diversaj homoj inkluzive de akademiaj esploristoj, oficistoj de UN, kaj internaciaj diplomatoj. Ĝus disiris la alvoko por kontribuoj al la ĉi-jara simpozio (9-10 majo), pri la temo “UN 75-jara: Aŭskulti, paroli kaj agadi en multlingva mondo”. La simpozioj celas atentigi pri la graveco de lingvaj demandoj en la laboro de UN, kaj pri la pozitiva kontribuo de Esperanto kaj la Esperanto-movado al la solvado de tiuj demandoj.

Multaj el la internaciaj tagoj kaj jaroj proklamitaj de UN havas apartan signifon por esperantistoj. UEA do sisteme kaptas tiujn okazojn por diskonigi la perspektivon kaj agadon de esperantistoj sur la koncernaj kampoj. En la lastaj monatoj, ekzemple, dissendiĝis komunikoj pri:

- Internacia Tago de Paco, 21an de septembro
- Monda Turisma Tago, 27an de septembro
- Internacia Tago de Tradukado, 30an de septembro
- Internacia Tago de Pli Aĝaj Personoj, 1an de oktobro
- Internacia Tago de Ne-perforto, 2an de oktobro

- Tago de Unuiĝintaj Nacioj, 24an de oktobro
- Internacia Tago por Toleremo, 16an de novembro
- Internacia Tago de Homaj Rajtoj, 10an de decembro.

Plej aktuale, UEA aliĝis kiel oficiala partnero de la Internacia Jaro de Indiĝenaj Lingvoj (2019). Multaj esperantistoj havas personajn kontaktojn kun aktivuloj por indiĝenaj lingvoj kaj kulturoj, kaj ekzistas granda simpatio kaj subtenemo al tiuj popoloj en la movado ĝenerale. Por soleni la Jaron, UEA planas i.a. plurflankan programon kun indiĝenaj gastoj en la Universala Kongreso en Lahtio, Finnlando, kaj E-lingvan eldonon de la Deklaracio de UN pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj.

La posta jaro, 2020, alportos la 75an datrevenon de UN. Tial por la 105a UK en Montrealo, la Estraro decidis pri la temo “UN 75-jara: Dialogo kaj interkompreniĝo en ŝanĝiganta mondo.” Per frua difino de la temo, nomumo de reĝisoro, kaj kontaktado de partneroj kaj kunlaborantoj, UEA celas elmontri al internacia publiko la multflankan engaĝigon de la Esperanto-movado kun la streboj al pli paca, justa kaj daŭripova mondo.

Esperantistoj, kiuj volas sekvi ĉi tiun agadon kaj eventuale partopreni en ĝi, povas trovi aktualajn informojn ĉe la retejo de “Esperanto por UN,” <http://www.esperantoporun.org/>, inkluzive de sugestoj pri kunlaboro kaj aliaj formoj de subteno. Donacoj por la agado ĉe UN kaj Unesko estas ĉiam bonvenaj: rigardu ĉe la paĝo <http://www.esperantoporun.org/subtenu-nin/> aŭ iru rekte al la donaca paĝo de UEA, <https://uea.org/alighoj/donacoj>, kaj elektu “Unesko” aŭ “Novjorka Oficejo”. Eventuale, honore al ĉi tiu 777a Gazetara Komuniko kaj la adreso de nia oficejo, pripensu donaci 7,77 EUR, 77,70 EUR aŭ eĉ 777,00 EUR por subteni tiun valoran aktivadon.

La Balta Ondo

MORTIS BALDUR RAGNARSSON

La 25-an de decembro, 88-jara li forpasis en Reykjavik. Grandulo de la moderna esperanta poezio, kandidato por Nobelpremio el literaturo.



“Por mi poezio estas esploro; kaj maniero kapti disfluantajn sentojn kaj impresojn por ilin fiksi en spaco kaj tempo”, li skribis. Multegajn li kaptis inter liaj pemarkoj *Ŝtupoj sen nomo* (1959) kaj *La momentoj kaj meditoj* (2016). Krome li verkis eseojn, prelegojn, tradukojn el la islanda –

inter multaj aliaj sagaojn kaj *Sendependajn homojn* de Halldor Laxness (esperanto.net/literaturo/autor/ragnarssonesej.c.html).

Mariboraj esperantistoj memoros lin kiel amikon. Post nia interkonatiĝo en Graz okaze de 100-jariĝo de esperanto kaj multjara korespondado, li akceptis la inviton veni al Maribor. Fine de septembro 2004, kadre de Lingva festivalo, li prelegis pri la islanda lingvo. Ni fieris havi inter ni la grandan verkiston el fora Islando. Kvar tagojn ni pasigis kune. Ni iom miris komence. Liaj versoj estis ofte pesimismaj, profundaj kaj ne facile kompreneblaj, sed li montriĝis homo modesta, hela, serena, kiel lia amata esperanto. Li rakontis pri sia hejmlando, tiel aparta, pri kulturo Islanda, eĉ kanton popolan li kantis al ni. Interŝanĝe, li deziris aŭdi slovenan. Kaj pri sia junaĝo kaj memlernado de esperanto li rakontis. 16-jara li dumsomere laboris kiel vojlaboristo en norda montara valo. Vespere, post la laboro, li studis. Same dum manĝopausoj, la lernolibron portadis en poŝo al la laboro, tiom kaptis lin la lingvo. Post kelksemajna intensa lernado li komencis korespondi.

Pri Slovenio li jam informiĝis hejme. Plaĉis al li la naturo, ankoraŭ verda en aŭtuno. Nudpieda li paŝis tra herbejo kaj instigis nin fari same. Ke ni ne sufiĉe aprezas tion, li opiniis. Tamen ni plej multe parolis pri nia komuna lingvo. Pri lia sinteno al Esperanto, kiu tuj ravis lin sente kaj intelekte, pri la ĝojo, kian li sentas kreante poemojn, pri la genia ideo de interpopola komunikado en neŭtrala lingvo, kiun necesas diskonigadi pli. Li nomis Esperanto literaturon miraklon, mirindan kaj amindan. Sentebliis amo en ĉiu lia vorto, ni admire aŭskultis, la etoso estis emociplena.

“Mi havas longan verkistan karieron ankaŭ en la islanda lingvo, sed mia Esperanta verkisteco estas al mi pli kara.“ Dirinte tion liaj okuloj hele brilis. Tian ni memoras lin, poeton en “la lingvo serena“.

Zdenka Rojc

TRI KONGRESOJ EN MALAGO

La 15an de januaro finiĝis la unua aliĝperiodo de la tri kongresoj de Esperanto okazontaj en Malago (Hispanio) en la komenco de majo: hispana, andaluza kaj internacia fervojista (IFEF). Jam preskaŭ 100 homoj aliĝis:
<http://esperanto-andalucia.info/aligintoj/>

José Antonio del Barrio

KOREKTO DE TEKSTO EN PASINTA NUMERO

Mi rimarkis ke envenis eraro en mia artikoleto pri la irlanda historio.
“Ĉiu anglo en Irlando devas lerni la **irlandan** lingvon, kaj se li rifuzas, li estos traktata kiel irlanda malamiko”
devus esti
“Ĉiu anglo en Irlando devas lerni la **anglan** lingvon, kaj se li rifuzas, li estos traktata kiel irlanda malamiko”

Tiu leĝo montras ke en tiu periodo, 1366, la angloj de Irlando jam tute perdis la anglan lingvon, kaj parolis nur irlande.....la leĝo celis devigi ilin lerni la anglan, ne la irlandan!

Seán Ó Riain

STUDSEMAJNO EN KVINPETALO

Kio? Praktikado de Esperanto je diversaj niveloj

Kie? En la kulturcentro Kvinpetalo, en vilaĝo Bouresse en bela regiono Puatuo

Kiam? De la 25a de februaro ĝis la 1a de marto, kiam proksimiĝas printempo

Kun kiuj? Elstaraj gvidantoj (kaj same elstaraj partoprenantoj: vi)

Praktikado de la lingvo plurnivela kun Andrea Bertrand

La kurso koncernas komencantojn, komencintojn, progresantojn... Studado en etaj grupoj, adaptita pedagogio, familieca etoso.



Trianivelaj studoj kun Brian Moon:

Al tiuj, kiuj jam iom regas la lingvon, ni proponas iom da enprofundiĝo en la kulturo esperanta. Temas pri la studprogramo de la triagrada ekzameno "Atesto pri Supera Lernado" de Franca Esperanto-Instituto. Dum kvin tagoj ni iom studos la librojn preskribitajn por tiu ekzameno kaj faros aliajn lingvajn ekzercojn. Kaj la tuto estos certe interesa ankaŭ por tiuj, kiuj ne celas al la ekzameno.

Venu kaj ĝuu la esperantan literaturon!

Estas antaŭvidita sesio de la triagrada ekzameno (Atesto pri Supera Lernado) en novembro 2019 en Parizo.

Esperanto-Centro Kvinpetalo

Akceptejo kaj poŝta adreso: 4 rue du Bureau, FR-86410 BOURESSE

Retadreso: informoj@kvinpetalo.org

Telefono: (+) 33 (0) 549 034 314

Retpaĝaro (pri restado, prezo, kaj aliaj teknikaj informoj): <http://www.kvinpetalo.org>

Claude Nourmont

BOLSONARO EN BRAZILIO VOLAS ASIMILI INDIĜENAJN GRUPOJN KUN NEPORTUGALAJ DENASKAJ LINGVOJ

"Pli ol miliono da homoj vivas en ĉi tiuj izolitaj lokoj en Brazilo, kie ili estas ekspluatataj kaj manipolataj fare de NGOj," Bolsonaro tvertis. "Ni kune integri ĉi tiujn civitanojn kaj valorigu ĉiujn brazilanojn."

Kritikistoj kaj ekologiistoj diras, ke la indiĝenaj popoloj de Brazilo nun estas en danĝero perdi siajn kulturojn kaj lingvojn per integriĝo en la komunan socion. Dinamã Tuxá de Brazila Asocio de Indiĝenaj Popoloj diris ke multaj denaskaj grupoj timas Bolsonaro-n.

"Ni tre timas, ĉar Bolsonaro atakas indiĝenajn politikojn, forprenante ekologiajn protektojn, rajtigante la invadon de indiĝenaj teritorioj kaj subtenante perforton kontraŭ indiĝenaj popoloj," diris Tuxá. (...) "

Fonto: Euronews: Brazil's Bolsonaro strips agency of power to mark out indigenous lands, unsettling native groups <https://www.euronews.com/2019/01/03/brazil-s-bolsonaro-strips-agency-of-power-to-mark-out-indigenous-lands-unsettling-native-g>

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj.

Finredaktita: la 31-an de januaro 2019

Redaktoro: Zlatko Tišljár

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljár, Edvige Ackerman, La Balta Ondo, Zdenka Rojc, Sean O Riain, José Antonio del Barrio, Claude Nourmont

Kontakto: ztislar (ĉe) gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

